

Programskizo pri VEKI 15-an de junio 2020

La informoj pri VEKI troviĝas en www.ilei.info.

Detala artikolo troviĝas en vikipedio :

https://eo.wikipedia.org/wiki/53-a_Virtuala_Esperanto-Konferenco_ILEI_2020

Jam alvenis prelegpronoj por konstrui buntan programon. Jam artistoj proponis koncertojn.

Se vi volas prezenti pedagogian informon pri metodologio, nova lernolibro, interesa instrusperto, bonvole anoncu vin ! Se vi volas prezenti agadon en via universitato, bonvole anoncu vin ! Se vi volas sendi filmon pri tipa plado de via regiono, prezentendan en la Gastronomia Rondo, bonvole anoncu vin ! Se vi volas prezenti lingvon kadre de la Lingva Festivalo, bonvole anoncu vin ! Se vi volas kontribui al malstreĉiĝo, distriĝo kaj ĝuo de la partoprenantoj per kanto aŭ muziko iaspeca, bonvole anoncu vin !

Por anonci iun kontribuon al la programo de VEKI, bonvole skribu al Mireille Grosjean ilei.prezidanto@gmail.com antaŭ la fino de junio.

En dimanĉo **la 26-an de julio** ni festos **nian lingvon** dum la **Tago de la Komitato**. Fakto estas, ke la lingvo aperis ekzakte en tiu tago 26-an de julio, tio estas, ke Zamenhof tiam ricevis la oficialan permeson diskonigi sian **unuan libron**.

En vendredo 31-an de julio okazos **AMO-seminario**, tio estas Aktivula Maturigo. Aktivuloj estas personoj, kiuj ne nur uzas la lingvon legante aŭ vojaĝante, sed personoj, kiuj transprenas ian oficon en sia loka klubo, en iu Esperanto-centro, en iu Asocio. Laŭ tiu klarigo instruistoj estas aktivuloj. Konsekvence nia AMO-seminario kadre de VEKI havos sian fokuson sur la instruistoj, iliaj roloj, iliaj taskoj, iliaj devoj, iliaj defioj, iliaj respondecoj.

AMO 66 : Instruistoj - iliaj roloj, taskoj kaj respondecoj

INSTRUISTOJ GVIDAS LERNADON (mi ne skribis : transdonas sciojn....)

iliaj taskoj

iliaj respondecoj

iliaj devoj

ilia motivado

podia diskuto kun kvar fakuloj

demandoj el la partoprenantaro alvenas kaj podianoj respondas

INSTRUISTOJ ESTAS HOMOJ KUN INFANOJ KAJ JUNULOJ

ĉu pli da viroj, pli da virinoj en tiu profesio?

ĉu tuŝi au ne tuŝi ?

ĉu puni au ne puni ?

ĉu bati au ne bati ?

junulinoj tentas instruistojn

perdo de prestiĝo

malfacila profesio

profesio sen kariera plano kaj kreskanta salajro

podia diskuto kun kvar fakuloj

demandoj el la partoprenantaro alvenas kaj podianoj respondas

La preparlaboroj plu iras.

Ni tre antaŭĝojas pri tiu freneza semajno.

Mireille Grosjean

2020-06-15